# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

ĵaŭdon, la 6-an de Julio, 2017 • numero tri

## Hodiaŭ

- ★ **7:30 atm:** Matenmanĝo
- ★ **8:30 – 12:15 ptm:** Lecionoj
- ★ **12:15 ptm:** Tagmanĝo
- ★ **2:00 – 3:00 ptm:** KER-ekzamenoj: Informo kaj preparado por tiuj, kiuj planas ekzameniĝi dum NASK *Flowe 110*
- ★ **3:15 – 4:30 ptm:** Laborsesio de KTF – Voĉregistrado de la libro de Richardson kaj de infanlibro pri senglutendieta pirato. *Flowe 110 (kontrolu la blankan tabulon en Flowe 110 por eventuala lokoŝanĝo)*
- ★ **5:30 ptm:** Vespermanĝo
- ★ **7:00 – 8:00 ptm:** Ekparolu! Katalin priskribos la programon "Ekparolu!", kiu donas al lernantoj la eblon havi senpagajn parolsesiojn kun spertaj esperantistoj per skajpo. Ŝi kun Sylvain prezentos kelkajn skeĉojn por montri al vi ***kiel ne*** konversacii kun komencintoj. Venu kaj eksciu kiel vi povas partopreni la programon – ĉu kiel lernanto, ĉu kiel helpanto. *Flowe 110*

### Universitata Librovendejo

La librovendejo troviĝas tuj trans la vojeto de nia enirejo al la manĝejo. En fenestro estas multkolora ŝildo, kiu diras: "OPEN". En la vendejo troviĝas diversaj apotekaj aĵoj kiel: dentopasto, dentobroso, ŝampuo, produktoj por inaj bezonoj, medikamentoj (nur tiuj, kiuj ne postulas preskribon de kuracisto), kaj similaj.

La vendejo estos fermita dum la semajnfino.

## Ŝanĝo de la loko de la gufujo



Oni jam forpelis la gufojn for de la nestoj, sed bonŝance ili jam trovis alian, pli bonan lokon! La gufujo **ne** estos en la 3a etaĝo de *Finley Hall*, sed en la salono en la 4a etaĝo de la ĉefa konstruaĵo (*Main Building*). Bonvolu flugi tien, se vi bezonos malstreĉi viajn flugilojn.

## Pensi kiel monto *de Aldo LEOPOLD, elangligita de Ray REDD*

*Aldo LEOPOLD (1887-1948) estis profesia arbaristo kaj poste profesoro. Liaj ideoj multe influis la medio-movadon kiu leviĝis poste en la dudeka jarcento. La evento priskribita ĉi tie okazis en Arizono aŭ Nov-Meksiko iam en la jaroj 1911-1923; la eseo devenas de proksimume 1940.*



Profunda, resonanca krio eĥoas de klifo al klifo, rulas malsupren de la monto, kaj fadas en la foran nigron de nokto. Ĝi estas eksplodo de sovaĝa, defia malĝojo, kaj de malestimo al ĉiuj el la malfavoroj de la mondo.

Ĉiu vivulo (kaj eble multaj mortuloj kune) atentas tiun vokon. Al la cervo, ĝi estas memorigo de la sorto de ĉia karno, al la pino antaŭvido de meznoktaj bataloj kaj de sango sur la neĝo, al la kojoto promeso de venontaj restaĵoj, al la ranĉisto minaco de ruĝa inko ĉe la banko, al la ĉasisto defio de dentego kontraŭ kuglo. Sed malantaŭ tiuj evidentaj kaj tujaj esperoj kaj timoj kuŝas pli profunda senco, konata nur de la monto mem. Nur la monto vivis sufiĉe longe por aŭskulte objektive la hurlon de lupo.

Tiuj malkapablaj deĉifri la kaŝitan sencon tamen scias, ke ĝi tieas, ĉar ĝi sentiĝas en la tuta luptereno, kaj distingas tiun terenon de ĉiu alia tereno. Ĝi piketadas la spinon de ĉiuj kiuj aŭdas lupojn nokte, aŭ kiuj rigardas lupŝpurojn tage. Eĉ sen vido aŭ sono de lupo, ĝi implicitas en cento da eventetoj: la meznokta hino de portĉevalo, la klakado de rulantaj ŝtonoj, la salto de fuĝanta cervo, la maniero, laŭ kiu ombroj kuŝas sub piceoj. Nur la needukebla naivulo povas ne senti la ĉeeston aŭ neĉeeston de lupoj, aŭ tion, ke montoj havas sekretan opinion pri ili.

Mia propra konvinko de tio devenas de la tago kiam mi vidis lupon morti. Ni manĝis lunĉon ĉe rando de alta klifo, ĉe la piedo de kiu turbula rivero fluis. Ni vidis tion, kion ni pensis esti cervino, ŝia brusto lavata de blanka akvo. Kiam ŝi supreniris la riverbordon, ni rekonis nian eraron: estis lupo. Ses aliaj, evidente duonkreskaj lupidoj, saltis el la salikoj, kaj ĉiuj partoprenis la bonvenan agadon de flirtantaj vostoj kaj luda luktado. Tiu, kiu estis fakte stako da lupoj ludis kaj ruliĝis en centro de malferma plataĵo ĉe la piedo de nia klifo.

Tiutempe, ni neniam aŭdis pri preterpasi ŝancon mortigi lupon. En malpli ol sekundo ni ekpafadis kuglojn en la amason, sed per pli da ekscito ol precizo: kiel celi krute malsupran

pafon ĉiam konfuzas. Kiam niaj fusiloj malplenis, la maljuna lupo ne plu moviĝis, kaj lupido trenis kruron en netrapaseblajn flankŝtonojn.

Ni atingis la maljunan lupon ĝustatempe por spekti fieran verdan fajron mortantan en ŝiaj okuloj. Mi ekkonsciis, kaj konscias ĉiam ekde tiam, ke estis io nova al mi en tiuj okuloj – io konata nur de ŝi kaj de la monto. Mi junis tiam, kaj plenis de pafavido; mi pensis tion, ke ĉar ju malpli da lupoj des pli da cervoj, neniom da lupoj estus paradizo por ĉasistoj. Sed post vidi la verdan fajron morti, mi konsciis pri tio, ke nek la lupo, nek la monto konsentis al tia opinio.

Ekde tiam, mi vivis vidi ŝtaton post ŝtato ekstermi siajn lupojn. Mi rigardis la vizaĝojn de multaj nove senlupaj montoj, kaj vidis la sudajn deklivojn sulkiĝi pro novaj cervpadoj. Mi vidis ĉiun manĝeblan arbuston furaĝiĝi, unue al stato de anemia kaduko, poste al morto. Mi vidis ĉiun manĝeblan arbon senfoliiĝi ĝis la alto de selo. Tia monto aspektas tiel, kvazaŭ oni donis al Dio stucilon kaj malpermesis al Li iun alian ekzercon. Fine, la malsatiĝintaj ostoj de la esperita cervgrego, mortinta pro sia propra troeco, paliĝas kun la ostoj de mortintaj artemizioj aŭ putras sub la ĝisalte formanĝitaj juniperoj.

Mi nun suspektas tion, ke samkiel cervaro vivas en timego de lupoj, tiel monto vivas en timego de cervoj. Kaj eble kun pli bona kialo, ĉar vircervo mortiginta de lupoj povas anstataŭiĝi post du aŭ tri jaroj, sed tereno detruita de tromulto da cervoj eble malsukcesos anstataŭiĝi post tiom da jardekoj.

Tiel ankaŭ pri bovoj. La ranĉisto kiu senlupigas sian paŝtejon ne konscias pri tio, ke li prenas la taskon de la lupo, malpliigi la gregon por ke ĝi taŭgu al la paŝtejo. Li ne lernis pensi kiel monto. Tial ni havas polvbovlojn, kaj riverojn lavantajn la estontecon en la maron.

Ni ĉiuj strebas atingi sekurecon, prosperon, komforton, longan vivon, kaj enuon. La cervo strebas per siaj lertaj kruroj, la ranĉisto per siaj kaptiloj kaj veneno, la politikisto per plumo, la plimulto el ni per maŝinoj, voĉdonoj, kaj dolaroj, sed la efiko estas la sama: paco en nia tempo. Iom da sukceso en tio sufiĉe bonas, kaj eble estas necesa kondiĉo por objektiva pensado, sed tromulto da sekureco ŝajne fine rezultigas danĝeron. Eble tio estas malantaŭ la diraĵo de Thoreau: en sovaĝeco estas la savo de la mondo. Eble tio estas la kaŝita senco en la hurlo de la lupo, longe konata inter montoj, sed malofte perceptata de homoj.

# Interkona ludo inter la klasoj!

*de Amanda Higley SCHMIDT*

Ni ĉiuj bone konos niajn samklasanojn, sed kiom bone vi konos la aliajn klasanojn? Ĉu vi jam havis ŝancon paroli kun iu, kiu ne estas en via propra nivelo? Se ne, jen ŝanco amuze interkonatiĝi. Mi eltrovos interesajn informojn pri ĉiuj NASKanoj kaj kompilos liston. Via tasko estos trovi la homon, pri kiu ĉiu informo temas. Ekzemple: kiu inter ni neniam en sia vivo posedis propran aŭton? Eltrovu! La listo aperos en la NASKa Fasko post kelkaj tagoj.

## Amikoj en Drinkejo: Vortluda Versaraĉo

*de Ray REDD*

Inter ni troviĝis elokvento.

Sed poste troiĝis **elo**-kvanto.



